

# KOMUNIKOU

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 42-a BRAZILO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2018 N-ro 169

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero*.

## KUNLABORO

Alberto Flores

**T**iu substantiva vorto estas kunmetaĵo kreita per la kuniĝo de du aliaj vortoj: unu estas KUN, prepozicio kiu signifas: akompanon, kune esti; la alia estas vorto derivita de la verbo LABORI; el ĝi devenas la substantivo LABORO, kiu signifas: uzi siajn korpajn aŭ mensajn fortojn por produkti aĵon, plenumi taskon aŭ atingi efikojn, fizikajn aŭ mensajn.

La vorto KUNLABORO enhavas ideon pri kopeerado por atingi difinitan celon, estu ĝi ekonomia, socia aŭ kultura. Kunlabori estas kunhelpi alian personon aŭ asocion, por faciligi al tiu ĉi atingi siajn celojn, aŭ efektiviĝi siajn revojn aŭ planojn. La KUNLABORO estas tre nobla kaj laŭdinda afero.

Kiam ni kunlaboras ni sentas nin kontentaj kaj feliĉaj, ĉar ni fariĝas utilaj kaj helpemaj. Se vi ne kredas je la valoro kaj utileco de kunlaboro, pripensu pri kio okazas al iu veturilo (vagono, kamiono, aŭtomobilo, ĉaro ktp.) se unu el la radoj decidus ne plu kunlabori; se ĝi rompiĝas aŭ ĉesas funkcii. Certe okazos akcidento, ĉu ne?

Eĉ malgranda kunlaboro estas efika. Observu kio okazas kiam malgranda radeto de via horloĝo faras strikon. Via horloĝo ĉesas funkcii kaj tio certe multe ĝenos vin! Rimarku kiel, en via korpo, la kunlaboro estas deviga kaj ĝi okazas ĉiumomente. Via dekstra mano ĉiam kunlaboras kun la maldekstra por preni aŭ fari ion. Ekzemple: balai domon, stiri aŭtomobilon ktp. Observu ke unu el viaj kruroj ĉiam helpas (kunlaboras) kun la alia, por ke vi bone marŝu!

Ankaŭ rimarku ke la diversaj organoj de via korpo estas ĉiam kunlaborantaj unuj kun la aliaj. Se unu

organo ne kunlaboras kaj malbone funkcias, certe vi malsaniĝos kaj bedaŭros ke via koro, aŭ via hepato, aŭ via reno, aŭ viaj pulmoj ne volas kunlabori por via bonfarto.

En la esperantista movado ni povas kunlabori diversmaniere. Ni kunlaboras se ni pagas akurate nian kotizon; se ni partoprenas en la kunsidoj; se ni organizas aŭ instruas en E-kursoj; se ni aĉetas (kaj legas) librojn; se ni abonas revuojn en Esperanto ktp.

Mi estas tre favora al la kunlaboro de esperantistoj kun ne esperantistaj organizaĵoj, ĉar, ĝenerale, la ne esperantistaj asocioj havas pli fortan povon ol niaj esperantistaj kluboj. Ekzemple: mi kaj amikoj jam de 17 jaroj kunlaboras kun la “Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj” de la urbo Volta Redonda, - ŝtato Rio-de-Ĵanejro. Tiu Asocio zorgas pri la informado de senpaga E-kurso kiun ni okazigas ĉiun jaron en ties bela sidejo. Tie ĝi disponigas al ni tre komfortan lerno-ĉambron kun bona lumigado kaj ventolado, blankan tabulon, multajn brakseĝojn por faciligi la skribadon, horloĝon kaj projekciilon. La lecionoj okazas unu fojon en la semajno, merkrede, matene, kaj daŭras du horojn. Em la mezo de la leciono ni faras paŭzeton por trinki kafon kun biskvitoj (ĝentileco de la Asocio). Ĉi-jare okazas la 17-a senpaga E-kurso en tiu Asocio de Emeritoj, kies estraro estas tre kontenta pri la kunlaboro kun esperantistoj.

Do, se vi volas senti vin utila, vi nepre devas esti helpema kaj kunlaborema, ĉar per via kunlaborado al la Esperanto-Movado vi certe fariĝas tre kontenta kaj feliĉa homo. Ni laboru kune!

# AMIKOJ DE LORENZ

**PREZEMEK GRZYBOWSKI**, pola samideano, konstanta kunlaboranto de nia Eldonejo, verkisto, pilogloto, pedagogo... AMIKO DE LA ELDONEJO LORENZ!

Jen pecoj de la intervjuo kun Prezemek en Almanako Lorenz 2017:

## KION REPRESENTAS ESPERANTON POR VIA VIVO?

“Mi povas aserti, ke danke al Esperanto plilargiĝis miaj mensaj horizontoj kaj plifirmiĝis miaj intereso pri interkultura dialogo. Fakte, miaj nuntempaj ideoj, idealoj, sintenoj rilate al la mondo kaj al diverskulturaj socioj, miaj profesiaj intereso kaj familiaj spertoj dependis de diversaj aventuroj ligitaj kun Esperanto.

La listo de simpatiegaj esperantistaj geamikoj, kiujn mi amas kaj admiras, estas la pruvo ke Esperanto ligas homojn malgraŭ la limoj kaj lasas en iliaj koroj eternajn spurojn. Ĝuste tiel okazis kun mi danke al ĉiuj ĉi esperantistoj.

Pro miaj Esperanto-kontaktoj ligitaj kun instruado kaj prelegado mi vizitis pluraj landojn (Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉinio, Francio, Hungario, Vjetnamo...) kaj renkontis amason da mirindaj personoj, kiuj instruis al mi kiel vivi. Mi do ofte ŝercas ke mi estas la viktimo de Esperanto – evidente nur en tre pozitiva senco de la esprimo.”



## KION REPRESENTAS SPIRITISMO POR VIA VIVO?

“Spiritismo estas por mi signifoplena filozofio, el kiu oni povas ĉerpi inspiron kaj la moralan bazon aplikeblan en interkultura mondo. Mi ĉiam penas kaj parolas pri filozofio, ĉar mi ne ŝatas la nocion “doktrino”, kiu en mia medio havas negativan sencon (ĉe ni oni parolas pri doktrinoj stalinista, naciisma, nazia ktp., kiuj provokis amason da teruraj sociaj sekvoj, kaj tio ja neniel rilatas al Spiritismo!).”

# REDAKCI-ARTIKOLO

Karaj gelegantoj, ankoraŭ foje, Eldonejo Lorenz atingas vin kun multaj informoj: kuriozaĵoj, lanĉoj, pensoj, arto, poezio...

La pripensoj bonproportiaj de la vortoj atingas nian intimon, kaj kiam tiuj pripensoj estas prezentitaj pere de arto, atingas la esencon de la ulo.

Pro tio, jen **Komunikoj** por prezenti al niaj karaj gelegantoj iom da esenco pri kio ni laboras pere de Esperanto, ĉi lingvo kiu ne havas barojn kaj rompas la limojn de la tempo kaj de la spaco, kiu pripensigas nin kaj plibonigas nian vivmanieron.

Bonan legadon!

## KUNLABORU!

Membrigu ĉe **ASOCIO LORENZ** kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

## COLABORE!

Torne-se membro da **ASSOCIAÇÃO LORENZ** e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!



## LORENZ

### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 42-a – n-ro 169 | Januaro-Februaro-Marto 2018

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz


Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal

21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)

Telefona: + 55-21-2450-4768 | + 55-21-99058-4028 (Zap) | + 55-21-98485-4539

Skaĵo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora\_lorenz@uol.com.br

Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

## FELIĈA KONSTATO!

Gilbert Ledon (Francio)

**S**cii, havi plenan certecon pri la vivo post la morto, estas io mirinda kaj nepriskribebbla!

Mi, inĝeniero, aviadisto, ĵurnalisto, ateisto konvinka, kaj precipe, orgojle, mi parolas, mi asertas, mi atestas: Esperantisto!

Orgojle mi ĉiam laboris pri kaj por nia lingvo, ekde mia juneco ĝis mia lasta tago sur la Tero kaj nune, imagu, trans mia propra morto!

Mi konstatas ke la vivo ne ŝanĝiĝas, escepte de la fakto senti nian materion pli subtila, delikata, mi eĉ riskus... pli bela!

Tie ĉi, koloroj, akvoj, floroj, boskoj, konstruaĵoj, tuto!

La bedaŭro estas vidi vin, paroli al vi, sed konstati pri la sama blindeco kaj surdeco viaj, kiujn mi mem, iutage spertis!

Do, ni ekkomencas kompreni la utilecon de l' medio... sed alproksimiĝi de la taŭga medio ankaŭ ne estas facila afero!

Multaj el vi jam scias pri mi kaj mia nomo.

Mi kore dankas al vi ĉiuj la preĝojn favore al mi. Vi estas bonaj, veraj fratoj, amikoj!

Dank' al tio, hodiaŭ mi plibone komprenas aferojn kiujn al mi, hieraŭ, ŝajnis tute neeblaj.

Ĝis, karaj miaj.

Via, Gilbert Ledon

Mesaĝo psikografie ricevita de la medio Dirce Sales, en Esperanto, en 04/01/2009.

## FRATECA PETO

**H**elpu per via preĝo ĉiujn viajn fratojn: kiuj neniam trovas tempon aŭ rimedojn por esti utila al iu;

kiuj sin sentas ĉie vundataj de aliula maldankemo;

kiuj vindas al si la okulojn per nigra tolaĵo, por vidi malbonon en ĉiaj situacioj;

kiuj rigardadas mil kastelojn en la aero, sed ne ekbruligas eĉ unu kandelon sur la tero;

kiuj nur laboras en la ebura turo de sia persona kulto, ne malsuprenirante ĝiajn ŝtupojn por kunlabori kun la ceteraj;

kiuj sin kredas specialaj senditoj kaj kreditoroj je privilegioj;

kiuj konsumas altvaloran tempon de la aŭdantoj, parolante ekskluzive pri si mem;

kiuj rezignas lernadi plu en la homa lukto;

kiuj gardadas pardonpeton por ĉiuj siaj kulpoj;

kiuj pretendas la rolon de korifeoj en la mondumo;

kiuj sin opinias nepraj centroj de la ĝenerala intereso;

kiuj sisteme kultas malsanon kaj malhelpadon kontraŭ ĉio.

Ili estas suferantoj de grava malsano, bezonantaj la Silentan Helpon.

El la libro: **Kristana Agendo**

Spirito: **Andreo Ludoviko**

Medio: **Francisco Cândido Xavier**

## LANĈO

La lasta lanĉo de Lorenz estas la tre grava mediana verko, "La Senditoj", de la Spirito André Luiz, psikografiita de la brazila medio Francisco


Cândido Xavier. Se vi, ekster brazilaj samideanoj, volos ĝin ricevi, tute senpage, sciigu al ni vian kompletan nomon kaj poŝtadreson. Se vi jam ricevas niajn librojn, ne bezonas skribi al ni. Nia retpoŝtadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

Jen resumo de la verko:

Ĉi tiu libro rivelas ke la korpa morto senvualigas la spiritan vivon kiel kontinuan evoluoprocezon.

Ĝiaj kvindek unu ĉapitroj rakontas pri la sperto de pluraj Spiritoj, kiuj reenkarniĝis kun planitaj taskoj necesaj al sia perfektigado. Tie ĉi ankaŭ estas pritraktataj tiaj temoj, kiel la kulto de la Evangelio en la hejmo, la bonfaraj efikoj de la praktikado de bono, la spirita malviglado kaj la timo antaŭ la morto.

La spirita aŭtoro evidentigas la oportunecon de la laboro de l' medioj kaj ilin avertas pri la neceso praktikadi la spiritajn instruojn en la intima sfero, celante evitigi al ili la revenon en la Spiritan Mondon sen la plenumado de la akceptitaj sin devontigoj.



## AS PRECES

Elevam-se todos os dias às esferas  
Celestes muitas preces dos terrículas;  
Mãos piedosas erguem-se com gemidos,  
Vozes chorosas queixam-se dos sofrimentos.

Elevam-se dos cárceres queixosas orações,  
Pedindo auxílio contra os tiranos;  
Elevam-se súplicas doridas contra as doenças,  
As desventuras e os pesados fardos da miséria.

Os anjos recebem em caminho  
As preces dirigidas aos céus  
E lhes examinam a razão de ser;

As queixas injustas ficam sem resposta;  
Só quando o exame dos anjos encontra justa no pedido,  
O Auxílio Divino desce aos suplicantes.

## PRI LA PREĜOJ

Leviĝas ĉiutage al la sferoj  
Ĉielaj multaj preĝoj de l' teranoj;  
Kun ĝem' interplektiĝas piaj manoj,  
Plorantaj voĉoj pri l' suferoj.

Leviĝas plendaj preĝoj el karceroj,  
Petante helpon kontraŭ la tiranoj;  
Leviĝas plendaj preĝoj pri l' malsanoj,  
Pri l' malfeliĉ' kaj pezaj pri l' mizeroj.

La preĝojn, direktitajn al ĉieloj,  
Ricevas sur la vojo la anĝeloj  
Kaj ilin pri la pravo ekzamenas;

Maljustaj plendoj restas sen respondo;  
Nur kie pruvis juston l' anĝelsondo,  
Helpado Dia al preĝintoj venas.

Spirito: João da Cruz e Souza  
Mediumo: Francisco Cândido Xavier




João da Cruz e Souza naskiĝis la 24-an de Decembro 1861 en Nossa Senhora do Desterro, nuntempe Florianópolis, SC (Brazilo). Li elkarniĝis en la 19-a de marto 1898 en Antônio Carlos, MG (Brazilo). Cruz e Souza estis poeto kaj aktiva konferencisto

por la abolicio. La franca kritiko konsideris lin kiel unu el la plej gravaj simboloj de la okcidenta poezio.

Fonto: *Reformador*, jan./1950, p. 3.  
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

# ALMANAKO LORENZ



Karaj geamikoj el la tuta mondo, se vi volos ricevi, senpage, pere de Interreto, pdf-ajn versiojn de Almanakoj Lorenz, sciigu al ni vian retadreson kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi:

editora\_lorenz@uol.com.br

## Alma Nua

Minha alma nua  
No colo de Deus,  
Se alimenta.

Ele cuida de mim  
Porque me ama.

Seu carinho me conforta,  
Seu calor me protege.

Sua voz me acalma,  
Seu colo me levanta.

Sou alma da Sua alma,  
Criança frágil, mas feliz.

Às vezes, choro, me sujo...  
E Ele me limpa, me afaga  
E me beija.

Ouço Suas canções de ninar  
E adormeço nos Seus braços.

## Simpla Animo

Mia simpla animo  
Ĉe la brusto de Dio,  
Sin nutras.

Li min flegas  
Ĉar Li min amas.

Lia zorgo min konsolas,  
Lia varmosento min protektas.

Lia voĉo min trankviligas,  
Lia brusto min starigas.

Mi estas animo de Lia animo,  
Malfirma infano, sed feliĉa.

Kelkfoje mi ploras,  
Mi malpurigas min...  
Li min purigas, min karesas  
Kaj min kisas.

Miaŭdas Liajn lulajn kanzonojn  
Kaj mi ekdormas ĉe Liaj brakoj.

(Kunlaboras: Rogério Mota - Brazilo)

Tradukita el la portugala lingvo de Paulo Roberto Carvalho

## À Minha Terapeuta

Clausurando sereno aquela porta  
Não mais me sustento em coerência  
Já não sou mais eu, sou minha essência  
E a ti evolva minh' alma semimorta

Não és simples terapeuta, és grande alma  
A quem confio meu destino e vida  
És porto de chegada e de partida  
Onde a tempestade se acalma

Busco em ti consolo clínico, amparo  
Alguém que me sustenha na aflição  
E que possa ajudar-me a caminhar

Ajudar-me a remover os anteparos  
Em sinergismo vencer a depressão  
E perdoar-me sem antes me julgar...

## Al Mia Terapeŭtino

Interne de ĉi ĉambro enŝlosita  
Ne plu staras mi en kohereco  
Anstataŭ mi jen mia esenco  
Antaŭ vi animo mia frakasita

Antaŭ vi mia animo sterniĝas,  
Multe pli vi donas ol terapí  
Haveno de esperoj estas vi  
Kie ĉiaj tempestoj sereniĝas

En vi serĉas mi klinikan helpon,  
Iun, kiu min gvidos dum afliktoj  
Kaj min helpos tra iri vivobatojn

Igante min kapabla kontraŭstari,  
En sinergio deprimiĝon venki  
Helpante min formovi obstaklojn...

Célio Freitas Martins

**D**anke al mia vizito en Rio de Janeiro en la jaro 2014 mi havis unuajn, senperajn kontaktojn kun brazilaj esperantistoj-spiritistoj.

En Pollando homoj malmulte scias pri ilia agado por paco kaj interkompreniĝo. Mi kaj miaj geamikoj Iza kaj Ĉeslavo unue serĉis informojn ĉe Vikipedio kaj en Almanakoj Lorenz, kiujn ni posedis en la biblioteko. Surloke ni trovis homojn perfekte uzantajn nian universalan lingvon por interpreti la sanktan libron

de kristanoj – Bibliion. Ni admiris amikajn rilatojn regantajn en la komunumo de spiritistoj. Al la legantoj el la Esperanto-Libraro plaĉas la tekstoj publikigataj en Almanakoj Lorenz pro diversaj temoj de verkoj kaj pro plena de eleganteco, tute senagresema formo de prezentado de ili.

Viaj polaj geamikoj deziras prosperon al Eldonejo Lorenz por venontaj jaroj!

Plejamike,

Ela Karczewska – Pollando



Ela Karczewska

Foto de Mária K...

## NI REKOMENDAS

Retejo de TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO (TEVA)

[www.vegetarismo.info](http://www.vegetarismo.info)

La asocio disvastigas Esperanton inter vegetaranoj kaj vegetarismo inter esperantistoj, kaj varme bonvenigas ĉiujn kiuj vojaĝas sur tiujn ĉi du verdajn vojojn aŭ serĉas informojn pri kiel tion fari.

## NI RICEVIS KAJ REKOMENDAS

Monata gazeto **INFORMILO** kun ĝia suplemento **AUTAŬEN**:



## SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al

[editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

